




Oficiala Organo
de

Flandra
Ligo
Esperantista



JARA ABONPREZO: 20 fr. — Eksterlando: 5 belgoj.

Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.

Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag

Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekkonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

Pallierter — F. Timmermans	Fr. 45,— bind.
Leono de Flandrujo — Conscience	55,— »
La Viro el Francujo — Ivans	29,— »
Per Balono al la Poluso — Andrée	65,— »
Viktimoj — J. Baghy	30,— »
Verdaj Donkifotoj — J. Baghy	20,— »
Tra la Labirinto de la Gramatiko	45,— »
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50 broŝ.
Amo kaj Poezio — Jan Van Schoor	10,— »
La Du Amatinoj — de Musset	7,50 »
La Junulino el Stormyr — Selma Lagerlöf	12,— »
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,— »
La Infanoj de Betlehem — Selma Lagerlöf	5,— »
Dialogoj kaj Komeditoj — E. Dahl	3,75 »
Barbro kaj Eriko — Letera romaneto	4,— »
La Stranga Butiko — R. Schwartz	18,— »
Gaja Lernolibro (ilustrita)	15,— »
Examenopgaven	12,— »
Leerboek Dirksen — 2 deelen	18,— »
Blinda Rozo — H. Conscience	4,— »
Het Esperanto in 10 lessen — Witterijck	5,— »
Woordenboekje Blok (1890 stamwoorden)	2,— »
Schidlof Zakwoordenboek	30,— »
Flandra Esper. 2-a, 3-a, 4-a kaj 5-a jarkolektoj (kompl.)	15,— »
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la n° 1)	10,— »
Fotografajo D-ro Zamenhof, bela poŝtkarto	2,— »

INSIGNOJ: Malgranda verda stelo: 2,00 fr.

Verda stelo, sur blanka fono: 2,50 fr.

Verda stelo, kun kruco: 2,50 fr.

Granda verda stelo, kun blanka rando: 4,50 fr.


Glumarkoj, en lingvo Flandra aŭ Esperanta: folio de 8 diversaj markoj kostas po 5,— fr. por 10 folioj.

Krajono kun surpriso « Esperanto »: 1,— fr.

Leterpapero kaj kovertoj por 20 po 3,— fr.

Poŝtkartoj: por 10 po 1 fr.

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Ĉefredaktoro:
C. Schroeyers
Transvaalstraat, 10
Berchem
Antwerpen



Administranto:
Gerard Debrouwere
Magdalenastr. 29
Kortrijk
Tel.: 1654

Jara abonprezo: 20 frankoj. — Eksterlando: 5 belgoj
Por membroj de « Flandra Ligo Esperantista » senpaga.
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Kortrijk.

Konstantaj kunlaborantoj: L. CALLOENS, G. DE-
BROUWERE, L. v. d. POEL, E. CORTVRIENDT,
A. LODEMA kaj aliaj.

Atentu !

Grava Komunikado !

Notu bone kaj ne forgesu !

Depost la 1a. de Novembro, la redakcio de "Flandra Esperantisto" estas plenumata de "Flandrema Grupo Esperantista" sub la gvidado de S.ro C. Schroeyers.

Nun la adreso de la redakcio estas: C. Schroeyers, Transvaalstraat No 10, Berchem-Antwerpen.

Ĉiujn artikolojn, komunikojn, korespondadon, rezen-
cotajn librojn, interŝanĝnumerojn, oni sendu estonte
al la suprenomita adreso.

Por mankantaj aŭ nericevitaj numeroj kaj ankaŭ
por adresŝanĝoj, la adreso restos: H.v.d. Mast,
Tweelingstraat No 6 Antwerpen.

La Ĉefredaktoro,
C. Schroeyers.

Flandra Ligo Esperantista

Generala kunsido en Gento, la 8an de decembro 1935. En la kafejo « Georges » Kataloniestraat, 2, (apud la Sta. Nikolaopreĝejo, Gent, okazos la Liga kunsido. Ĝi malfermiĝos je la 10a matene akurate.

TAGORDO

1. Raporto pri la antaŭa kunveno.
2. Propagando.
3. Ĉseh-kursoj en Flandrujo.
4. Propono de S.ro Telling pri Tutnederlanda Esperanto Ligo (T. E. L.).
5. Komunikoj de la kongreskomitato pri la Genta Kongreso en 1936.

Ni atendas la membrojn multope kaj je la fiksita horo.

La Prezidanto,
H. RAINSON.

Urga alvoko al niaj abonantoj

La presisto, kiu ĉiumonate presas nian revuon, postulas, ke ĉiuj tekstoj estu maŝinskribitaj. Ni komprenas lian postulon, ĉar ni konas la malfacilaĵojn, kiujn oni renkontas, ĉe la korektado de la manskribitaj tekstoj. Kelkaj el la ĉiumonate ricevataj manskribajoj estas legeblaj, sed ... la aliaj ! Tial ni povas imagi al ni, kiel la presisto, — kiu ne la unuan vorton de la Esp. lingvo komprenas —, sangŝvitas por identigi tiujn diablajn signaĉojn, kaj ke li ĉiufoje riskas kormalsaniĝi, pro timo ke li farus preserarojn!

Do, ni devas ĉiam kopii maŝine, la ensenditajn manskribajojn.

Sed, kiel maŝinskribi, sen maŝino ?

Neniu abonanto, en nia plej apuda proksimeco posedas skribmaŝinon, kaj ni vidas nin devigitaj aĉeti maŝinon.

Sed, kiel aĉeti maŝinon, sen mono ?

Ni certe ne intencas aĉeti novan maŝinon, ne, ni estas modestaj, kaj ni estus la plej feliĉaj homoj sur la tero, se ni disponus pri malnova, malmultekosta maŝino, kiu estus ankoraŭ en bona stato. La nura kondiĉo estas : ke ĝi skribu !

Ni trovis inter niaj samideanoj, ageman, ofereman maŝinskribistinon kaj ni ne volas kaŝi ŝian nomon, por ke ni povu ŝin publike danki tie-ĉi, pro ŝia bonvola helpemo : estas Fraŭlino Van der Mast.

Sed ni ne jam trovis la necesan monon ! Grava afero !

Jes, ni jam aŭdas la protestojn, kiujn vi sendas al nia adreso : estas krizo, mi ne havas troan monon, mi ne estas Krezuso, mi...
k.t.p.

Kiu ne havus etan sumon por helpi nin en nia granda laboro ! Oni donu kion oni kapablas doni : unu, du, kvin, dek, dudek fran-kojn, kaj ĉiuj mondonacoj estos danke ekceptataj !

Ni do malfermas novan rubrikon ; « *POR NIA PROPRA SKRIBMASINO* », ĝis la momento, kiam ni konstatos, ke ni posedas la sufiĉan sumon por fari la aĉeton.

Karaj samideanoj, blinde ĉerpu el via monujo kaj sendu la kapti-taĵojn al la adreso de S.ro Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.

Ni dankas jam antaŭe Vin ĉiujn, kiuj ne restos surdaj al nia ur-ĝanta alvoko.

LA REDAKCIO.

« *POR NIA PROPRA SKRIBMASINO* »

Anonimulo 20 fr. ; Minjono 10 fr. ; Jorjeto 15 fr. ; Ceulemans 10 fr. ; Cassier 5 fr. ; Beenhouwer 10 fr. ; Prijs 10 fr. ; Plaetevoet 1 fr. ; De Jongh 1 fr. ; Vissers 1 fr. ; Proost 1 fr. ; Mamor 5 fr.

Leteroj el Esperantujo

XII.

AMIKO LA KOKO,

Pro troa okupiteco mi devis prokrasti ĉi-tiun leteron al vi, sed mi rekompencos vian paciencon per sciigo de kelkaj interesaj nova-ĵoj.

En mia antaŭa letero mi skribis pri la enkonduko de Esp. rubriko en la nederlanda semajna gazeto « *Haagsche Post* », rubriko kiu plenigas tutan kolonon kaj estas redaktata de Andreo Cseh. Ĉiu-vendrede, ricevante la H. P.-n, mi unue legas, ĝuas, la Esp. rubri-kon. Ĉiu artikolo pritraktas tre aktualan temon ; interalie mi legis pri la interna ideo ; pri la fina venko, pri Laksmishvar Sinha, la hinda samideano, kiu vojaĝas tra Eŭropo per kaj por Esperanto ; kaj aliaj.

Mi ankaŭ skribis al vi, ke la redakcio, de H. P. senpage disponigis por la abonantoj Esp. ŝlosiletojn. Nu, en malpli ol 14 tagoj la kvanto — pli ol 1500 ekzempleroj — estis elĉerpita ! Tio pruvas ke tre inte-lekta publiko sin ekzercas por baldaŭ povi legi la Esp. kolonon tiel bone, kiel la nederlandlingvajn kolonojn de la H. P. Per tio mi, kompreneble, ne volas diri ke la nelegantoj de la H. P. estas ne inte-lektaj ! S.ro Cseh mem diras ke menui lando en la lastaj jaroj tiel « *verdiĝis* » kiel Nederlando. Modeste li silentas pri tio, ke dank' al lia metodo Nederlando tiel mirige verdiĝas.

Pri la elekto de impona titolo por la nomita Esp. rubriko, mi ankaŭ skribis kaj aldonis ke mi certe gajnos la premion. Sed, kvan-kam jam de post la 15a de oktobro fermiĝis la vetbatalo, ĝis nun mi ne legis la rezulton de ĝi. Car ne sole la H. P. — legantojn oni invi-

lis, sed ankaŭ la tutmondan Esperantistaron ! Tio kaŭzigas, ke miaj ŝancoj je la premio de 25 guldenoj ege malpliigas ! Kaj la fakto ke la redakcio de H. P. ĝis nun ne akceptis sian propran torton, kiun mi volis donaci al ĝi, estas malbona antaŭsigno !

Intertempe okazis novaj valoraj faktoj en Esperantujo. Eble por la unua fojo en nia movado, aktiva ministro kaj provincestro donis intervjuon en Esperanto al la konata S.ro Steiner, la prezidanto de la L. K. K. en Wien. Tio okazis en Bulgarujo kaj el la intervjuo montriĝis, ke la loko de la Universala kongreso en 1937 estos Warszawa, kaj ke en la sekvonta jaro, la bulgaraj aŭtoritatuloj volonte akceptus la Universalan Kongreson en Bulgarujo.

La regionala tribunalo en Rotterdam ankaŭ faris gravan decidon rilate al Esp. : ĝi konsentis ke S.ro M. de Waard, Esp.-instruisto en tiu urbo estu allasata al tiu tribunalo kiel « jurinta interpretisto ». S.ro De Waard elparolis la juron, kiu tekstas jene :

« Mi juras, ke mi plenumos miajn devojn kiel interpretisto por » Esperanto per la plej granda korekteco. Tiel helpu min Dio, plej » pontenca ! »

Tiu novaĵo estas certe granda morala venko por nia lingvo, ĉar la juĝistaro ja konfesas per tio, ke Esp. estas klera kaj uzata lingvo, kiel ĉiu alia. Morala venko mi diris. Ĉar en la praktiko de la proceduro nur tre, tre malofte estos bezonata Esp. interpretisto. Ĉiu procedanto aŭ atestanto prefere uzos sian gepatran lingvon en tribunalaĵoj aferoj ; kaj en ĉiuj civilizitaj landoj estas interpretistoj por ĉiaj lingvoj.

Imagu, ke procedas iu per lingvo por kiu ne ekzistas interpretisto : tiam la Esp. interpretisto ekfunkcius ... kondiĉe ke la procedanto parolus Esperanton ! Kaj tio estas preskaŭ ne okazbla.

Tamen, « estas nenio nova sub la suno ». Ĉar S.ro De Waard ne estas la unua jurinta interpretisto. Jam depost aŭgusto 1929 Ĉekoslovakujo posedas jurintan interpretiston de Esperanto, nome S.ron D.ron Ernst Gruber. Dua jurinta interpretist(in)o estas S.ino Magd. Jelinková en la sama lando. Mi ni sciigis, ĉu ili jam praktike funkciiis.

Pri U. E. A. jam delonge mi ne skribis al vi. Montriĝas tamen ke en diversaj Esperanto-medioj kreskas la malkontenteco kontraŭ la gvidado. S.ro Douglas P. Boatman, angla samideano, — kiu en « Heroldo » aperigas mallongajn sed energiajn artikolojn titolitajn « Sub Verda Signo », — verkis jenan verseton :

Pace dormu en Genevo

U. E. A. benata ;

Ronku ĝis movada kredo,

Aro komitata

Mi tuj aldonu ke S.ro Boatman nur iom ŝercas al la adreso de U. E. A. kaj ne celas esti malica. Sed malgraŭ tio mi trovis en la artikoleto riproĉeton al U. E. A., ke ĝi ne invitas la kunlaboradon de ĉiuj Esperantistaj entreprenoj. La artikolo finiĝas :

« Se la centra aŭtoritato de nia movado ne vigle sentigas sian forton, ne komunikas energion al la samideanoj ĉiulandaj, tiam la grupoj devas agi propravole. Ili ne atendu gvidadon de Genevo, ili

ne limigu sin je subteno de enlanda propagando ; sed ili rekte ekri-
latu kun grupoj en aliaj landoj kaj kunlaboru kun ili. »

Jen, nekonscie montras S-ro B. la vojon al F. L. E. !

La Flandraj Esperantistoj ne sentas sin hejmece en Belga Ligo Esperantista. Ili fondis propran Ligon. Tiu Ligo volas kunlabori internacie al la realigo de la sankta celo. U. E. A. rifuzas kunlaboron, ankaŭ post la kongreso de Kolonjo, el kiu ĝi (U. E. A.) revenis, « plilarĝiginta ! » Multaj aliaj grupoj kaj ligoj troviĝas en la sama situacio. Agante tiel, U. E. A. kreas inter la Esperantistoj opoziciojn, tie kaj tie-ĉi, kiuj baldaŭ sentos la neceson unuiĝi. Mi scias ke kelkmiloj da Esperantistoj en Nederlando vivas, kiuj pli — malpli troviĝas en la sama situacio. Ili jam estas laborantaj por grupigi ĉiujn unuiĝojn, kiuj ne trovas lokon en U. E. A. Ili volas, se eble, kunlabori kun U. E. A. ; se tio ne estos akceptata, ili agos sen U. E. A. kaj tiam ni spertos batalon kaj konkuradon, malprogresajn por Esperanto, kiujn U. E. A. mem kaŭzigis.

« Nur forta internacia organizo sekurigas la sukceson de Esperanto en la tuta mondo. Varbu konstante membrojn de ĉiuj kategorioj por U. E. A. »

Per dikaj literoj tiu-ĉi alvoko estas presita en « ESPERANTO » la organo de U. E. A. Sed ĝi ne diris « Lasu veni al mi la infanetojn kaj ne retenu ilin ».

Amike la via.

R. LA VULPO.

7a Flandra Kongreso - Gent

30an KAJ 31an DE MAJO KAJ 1an DE JUNIO 1936

Mendojn kaj mendojn oni bonvolu fari je P. C. 1530.50 je nomo de Ach. De Maertelaere. Proveniersterstraat, 25, Gent. Korespondadojn por la organiza komitato oni sendu al la adreso : Raapstraat, 82, Gent.

DUA KOMUNIKO

Kotizo : 12 fr-oj.

Glumarkoj trikoloraj estas haveblaj po 6 fr. la 100.

La grupoj bonvolu mendi ilin por siaj anoj.

Fervoja rabato : laŭ speciala permeso de la fervoja administracio la kutima rabato de 35 % validos enlande de la 29a de Majo ĝis la 2a de Junio.

Por la eksterlandanoj tiu rabato validos de la 29a de Majo ĝis la 12a de Junio.

La kongresanoj, kiuj venos de Anglujo rajtos je rabato de :

33 1/3 % sur la Brita fervojo (London-Dover).

30 % sur la linio Dover-Oostende.

50 % sur la havenotakso « Poll Tax » (Dover).

35 % sur la Belga fervojo.

Biletoj haveblaj en Dover (Marine) — Continental Express L. T. d. — kaj en London (Victoria). Valideco 15 tagojn.

Post pago de la *kotizo*, ĉiu kongresano ricevos karton, samtempe rajtigilo por la fervojo kaj sciigilo pri sia enskribo.

Por *Sabato vespere* la O.K. petas la personojn, kiuj volos partopreni ta tombolon, prepari kaj kunporti premieton, ĝi ne devas esti grandvalora, (sed almenaŭ 1 fr.on) kaj esti bone enpakigita.

Tiuj personoj, kiuj kunportos premion, rajtos gajni alian.

Landon ni intencas okazigi tuttagan boatekskurson sur la « Leie ». Pliaj sciigoj en la venonta bulteno.


Gent

BEGINOJ KAJ BEGINEJOJ

Artikolo aperinta en « Heroldo de Esperanto » la 14an de novembro 1925, kaj represita kun la permeso de la tiama ensendinto.

.....

Cu vi iam supozis, ke en nia agitita kaj progresema 20a jarcento ekzistas ankoraŭ urbetoj mezepokaj preskaŭ neŝanĝitaj? Tamen, en Flandrujo vi povas ankoraŭ vidi kelkajn da ili, kaj la du plej grandaj ekzistas en Gent, ĉefurbo de orienta Flandrujo en Belgujo. Gent estas industria urbo, kaj, post Antwerpen, la dua haveno de nia lando. La moderna progreso faris ĝin grandurbo. Imagu do, ke vi troviĝas en strato, kie la sonorado de elektraj tramoj, la muĝado de aŭtomobilaj ŝarĝveturiloj, la zumado de elegantaj aŭtomobiloj kaj de komfortaj turistveturiloj superbruas la takton de mult-homa paŝado.




GENT. — MALGRANDA BEGINEJO : Eliro post la Diservo

Promenante, vi alvenas antaŭ alta muro, kun nura enirpordego.

Vi enpaŝas kaj vi troviĝas en strato nelarĝa, kie kalkumitaj muretoj duone kaŝas blankajn unuetaĝajn dometojn kun ruĝaj tegmentoj. Vojoj senhomaj, floroj sur fenestrobretoj, herbokovritaj placoj kaj kantantaj birdoj en arboj altaj : ripozo absoluta. Ridetantaj virinoj en larĝaj, malhelaj kostumoj preterglitas. Artistoj antaŭ pentraĵo fiksis impreson de sereneco.

Estas la beginejo. Ĝi konsistas el aro da domegoj kaj dometoj — gracie aranĝitaj laŭlonge de kurbaj stratetoj kaj arabaj herbejoj, — en kiuj virinoj vivas vivon komunan. La urbeto havas propran preĝejon kaj estas ĉirkaŭita de muroj; la enirejo estas nokte fermita. En ĉiu el la dometoj, antaŭ kiu kuŝas ridanta ĝardeneto, loĝas du beginoj, kiuj antaŭe jam faris provrestadon en la grandaj domoj, kie vivas, dudek-aŭ tridekope, la junaj. Beginoj portas la pentrandan virinan kostumon de la 13a jarcento, kun granda blanka kapotuko, pendanta dorsflanke sur malhelblua larĝa robo. Sur la blanka tuko ili portas vualon, blankan por preĝo, nigran por promeno. Ili ne faris religian promeson, povas iri al siaj familianoj aŭ ricevi viziton se ili deziras. Ankaŭ ili povas reeniri la mondon kaj eĉ edziniĝi.



GENT. — MUZEO DE ANTIKVAĴOJ (*iama Bijloke-abatejo*)

La enirpordego estas tiu de la plej grandparte malkonstruita « Malnova Granda Beginejo de Sta Elisabeto », forlasita en 1874 de la beginoj, kiuj establiĝis en la « Nova Granda Beginejo en Sta Amansberg ».

Estas ege interese viziti ekzemple la malgrandan beginejon, kiu, kvankam lokita en industria kvartalo de la grandurbo, daŭrigas la mezepokan vivon en tempoj modernaj. Tie la religiaj ekzercoj ne rigidigas, tie la kvieteco de facila vivo kaj la malkaŝa gajeco de virinoj kune vivantaj, sen familiaj zorgoj, forgesigas al ni momente la malkvietan vivon de la 20a jarcento.

Gento estas, pro aliaj motivoj, tre interesa urbo. Ĝi havas ekzemple pli multe da monumentoj ol iu alia belga urbo ; ĝi ĝuigas per ravaj sonorilaj koncertoj el siaj turoj, ĝi posedas helpemajn esperantistojn,

kaj en ĝi la vivo estas malpli kosta ol en multaj turistaj centroj.

Se do iam vi pasus tra la malgranda, sed tre diverse bela Belgujo, ne forgesu viziti Gent (Gand, Ghent). Se vi volas ricevi specimenajn vidajojn pri ĝiaj beginejoj kaj aliaj vidindaĵoj, kiuj estas aro, bonvolu vin turni al la informa oficejo : Inlichtingskantoor, Halle-Belfort, Gent, Belgujo.

PROGRESANO.

PETO

Por eviti la kostojn, la O. K. de la 7a., ĝentile petas la kongrespartoprenont(in)ojn, kiuj bonvolus muzikludi sabatvespere, sin konigi al la kongresa komitato, Raapstraat, 82, Gent.

De la gvidonta samideano estas demandataj : pianoludist(in)o, violonist(in)oj, trumpettludisto, (nova diapazono).

Respondoj atendataj por la komenco de januaro 1936.

Esperantista Edzigo

La Flandraj Liganoj ofte aŭdis pri la Pioniranoj, kiuj en Aalst iam estis unu el la plej viglaj grupoj. La pioniron inter tiuj Pioniranoj, ili ankaŭ eble konas, pli pro lia agado kaj verkado, pro lia traduko de « Lenjo el la Ĉielregno », de « Etulino » de « Vi kaj Mi » k.t.p., ĉiuj teatraĵoj, kiuj ornāmis la festprogramojn de Flandraj Kongresoj. Li iam gvidis kurson de pli ol 80 personoj, li esperantigis la plej interesan parton de nia Aalsta publiko, li redaktis kursojn, pentris artajn bildojn por niaj kursoj, kaj se ne ekzistas nun en Aalst forta grupo, certe ne estas lia kulpo sed de aliaj personoj, kiuj ne posedis la sindonan karakteron de vera esperantisto kiel li.

Decas ke ni, esperantistoj flandraj, prezentu al li en la plej grava turno de lia vivo, nian sinceran samideanan feliĉdeziron : li edziĝis kun sia « Etulino », kun sia « Lenjo », kaj jam nun ili ĝuas sian miellunon.

Vera esperantista edziĝo : povu ĝi esti nova pruvo ke Esperanto alportas feliĉon. Gesinjoroj Roberto De Bondt-Van Mulders, la Flandraj Esperantistoj gratulas vin kaj esperas ĉiam revidi vin en siaj vicoj.

L. S. CELANO.

KURSGVIDANTOJ !!!

Vi deziras por viaj lernantoj malkaran, praktikan esp. lego- kaj lernolibron ?

Mendu tuj la unuan, binditan Jarkolekton de :

« LA JUNA VIVO »

200-paĝa libro en arta kovrilo

La prezo estas nur : 15 B. fr. (Mendebla ĉe Flandra Esperantisto) Grupoj ricevas rabaton !

Petu senpagan specimenon de « La Juna Vivo » !

(Red. : West-Graffdyk, N. H., Nederlando).

Diversaĵoj

S.ro Rainson, Prezidanto de Flandra Ligo, organizas Ĉsehkursojn. La provleciono okazos je la 19,30a. :

En Lier : Lundon la 16an de decembro.

En Leuven : Mardon la 17an de decembro.

En Brussel : Merkredon la 18an de decembro.

En Vilvoorde : Jaŭdon la 19an de decembro.

En Mechelen : Vendredon la 20an de decembro.

En Boom : Sabaton la 21an de decembro.

La Ĉsehinstruisto estas S.ro Jos. Ornstein, Rumano. Momente li gvidas Ĉsehkursojn en Nederlando.

Pliajn klarigojn oni petu al S.ro Rainson, organizanto. Ni deziras al nia simpatia Prezidanto multan sukceson.

La 5an de decembro, S.ro Rainson estos intervjuata pri Esperanto de la publika anoncisto antaŭ la mikrofono. (K.V.R.O.).

La intervjuo okazos je la 20,45a.

Red. — Ni faru propagandon precipe ĉe niaj amikoj ne-esperantistoj por ke ili aŭdu multope la propagandan intervjuon de nia senlaca Prezidanto.

28a Universala Kongreso de Esperanto

8-15 DE AŬGUSTO 1936, EN WIEN

Adreso : Esperanto-Kongreso, Wien, I. Neue Burg.

Kotizo en svisaj frankoj aŭ egalvaloro : por kongresanoj 28,—, por familianoj 18,—, por gejunuloj malpli ol 18 jaraj 12,—. *Helpkongresanoj* (grupoj, societoj, institucioj, firmoj, kiuj deziras montri sian simpatian al la kongreso, por helpi ties sukceson kaj por ricevi ĉiujn kongres-dokumentojn, sed ne sendos reprezentanton) pagas svis. fr. 12,—.

Favorkotizoj por frupagantoj : ĝis 31 de januaro 1936 sv. fr. 20,—, 12,50 kaj 8,25 ; ĝis 30 de aprilo 23,—, 14,25 kaj 9,50 ; ĝis 30 de junio sv. fr. 25,—, 16,— kaj 10,50.

Glumarkoj : Tre belaj glumarkoj en 5 koloroj po 0,70 svis. fr. la 100.

Kongresafiŝoj : 2 ekzempleroj kune kun 3 belegaj gvidlibretoj kontraŭ 1 poŝta respondkupono.

Radio-dissendadoj: *Komencante la 2an de oktobro* okazos ĉiun merkredon de la 18 h. 30 ĝis la 19 h. Radio-Esperanto-kurso el Radio — Wien. Je la fino de la kurso, do proksimume de la 18 h. 50 aŭ 18 h. 55 ni komunikos ĉiun merkredon informojn pri la kongreso, eventuale respondos demandojn.

Aliĝoj : Jam aliĝis pli ol 150 gesamideanoj el diversaj landoj.

Avantaĝoj de fru-aliĝo : Ricevo senpaga de la kongres-gazeto Aŭstria Esperantisto *jam* de l' monato de la aliĝo; *pli bona sidloko* en la teatro por la prezentado de l'opereto « La Blanka Ĉevaleto »; certigo de sidloko kaj de partopren-ebleco en la Turisma Servo « Tra Aŭstrio », ĉar nur certa nombro povos partopreni en ĉi tiu unika vojaĝo kaj tiel malmultekosta.

Tra Aŭstrio : Por tiuj samideanoj, kiuj ne sufiĉe frue aliĝos al « Tra Aŭstrio » aŭ ne deziras partopreni en ĝi, la aŭstria fervojo kaj ŝipkompanio ostas je dispono je rabatita prezo. Detaloj sekvos. Tiuj s-anoj kompreneble ne vidas tiom kiel la aliaj. La prezo por ĉi tiu 7-taga ekskurso A estas svis. fr. 124,—, 115 aŭ 109,— laŭ la kvalito de la noktigejoj. Enkalkulitaj estas veturado, vizitoj, prezentadoj dumvoje, bonaj kaj sufiĉe abundaj manĝaĵoj. Vegetaranoj ricevos senviandan bonegan menuon.

KARAVANOJ :

Brita Esperantista Asocio, 142, High Holborn, London W. C. 1.

Bulgara Esperantista Asocio, Poŝtenska kuf 233, Sofia.

Esperanto-Asocio de Estonio, Postkast 6, Tallinn.

Franca Societo por la Propagando de Esperanto, 59, rue de Neuilly, Rosny sous bois (Seine).

Jugoslavia Esperanto-Ligo, Zagreb, Primorska, 11.

Nederlanda Societo « La Estonto estas nia », S.ro P. H. Mooij, Tennishoemlaan, 19, Den Haag.

Pollanda Esperanto-Delegitaro, Lubiez, 34, Krakow.

Esperanta Turisma Komisiono, prez. E. Malmgren, Heleneborgsgatan, 6-C., Stockholm.

Svisa Esperanto-Instituto, d-ro E. Spielmann, Bern, Gesellschaftsstrasse, 39.

Aliaj karavanoj aranĝotaj.

Malhelnaĵoj : En diversaj landoj ekzistas diversaj malhelnaĵoj koncerne la ricevon de pasporto, de elvoiaĝvizo kaj kunpreno de mono. Informu nin pri ili, ni volonte helpos forigi ilin ! En *Bulgarujo* ekz. oni nur ricevas 300 L. : sed la tiea financ-ministro promesis al la L. K. K., ke 200 s-anoj, veturontaj al la 28a, ricevos no 5.000 Levoj krom la veturadkostoj sur Danubo al Wien. Imitinda ekzemplo !

Restado en Wien kaj Aŭstrio sufiĉe malmultekoste aranĝota de L. K. K.

Fervojarabatoj : En Aŭstrio 25 % rabato sur la fervojoj : sur la ŝinoj pago de unu vojo por tien kaj reen-veturadoj. Konsilu kaj helpu atingi rabatojn sur la fervojoj de la traveturotataj landoj !

Kontraŭ intern. poŝta respondkunono ni sendos la belan varbnumeron kun 3 belaj gvidfolioj. Aliĝu baldaŭ kaj ne tio faciliu al ni la laboron ! La kongreskartojn ni dissendos fine de 1935 (plej malfrue !).

Lkk de 28-a Univ. kongreso de Esperanto, Wien, Neue Burg.

Flandro Kaj Esperantisto

Estas kutimo ke, je la novjaro oni konkludas pri la pasinta, aŭ kalkulas pri la venonta jaro. Ankaŭ estas bone, mediti pri propagandpunktoj. Ni kaptas la okazon por preparoli la specialan lokon, ke ni, Flandraj Esperantistoj okupas, por klarigi nian sintenadon kiel Flandroj kiel Esperantistoj.

Ofte oni kritikis, unuavice la tiel nomatajn « Sennaciulojn » aŭ indiferentulojn, duavice la neesperantistojn, kiuj ĝuste pro naciaj kialoj restas dubantaj pri la valoro, pri la bona influo de Esperanto.

Estu ni bonaj Flandroj por esti pli bonaj homoj, pli bonaj Esperantistoj.

Tiu penso vere enhavas la esencon de la Flandra ligo-movado. La amo por nia nederlanda lingvo, por nia nacio ne estas ŝovinismo. Samideanoj el naciaj ŝtatoj « ordinare ne bone komprenas nian movadon, eĉ inter niaj lingvanoj, la Nederlandanoj, ni ja renkontas ofte miskomprenon aŭ nescion.

Sekve de tiu miskompreno, kelkaj eĉ taksas ĝin kiel fanatikecon, ŝovinismon, K. T. P.

Estas fakte kompreneble, ĉar en naciaj ŝtatoj, ĉio tre nature, tre konsekvence estas bazita sur nacia vidpunkto, estas pritraktata en la nacia lingvo. Tie neniu dubas pri tiu klara principo, kaj tiu natura stato do ne vekas reakcion kontraŭ iu nenacia, kontraŭ iu fremda influo. Kiam la ŝtato nacie estas sana, ne necesas movado kiel la nia. Ankaŭ ni esperas tutkore ke baldaŭ venu la tago, ke la nederlanda kulturo ne estu plu minacata en Flandrujo, ĉar tiam ankaŭ ni nure povus labori, tutame laboregi por la disvastigo de Esperanto, ĉar tiam ni povus doni ĉiujn niajn fortojn, nian plenan entuziasmon nur al la ideo de interfratigo de la popoloj per Esperanto.

Sed ne demandu al ni rezigni je la sana emo, kiu jam de nia infana aĝo inspiris kaj entuziasmigis nin ; ne demandu al ni silenti pri io, kiu estas pli forta ol la materio, kion ni sentas en nia animo, en nia sango, kaj kion ajn oni argumentus, ni ne povas nin senti « sennacia ». Sajnas al ni ke kun la amo por la « nacia », ni ankaŭ perdus la kredon en la « internacia ». Rezigni je la propra natura emo, kiu floras kiel ĉiu natura vivo, materiigus nian spiriton, mortigus la idealon en ni. Kaj certe en tiu-ĉi tempo ke Esperanto ne jam alportas materiajn gajnojn, monajn rezultatojn, ni certe perdus tiun forton, spiriton, tiun emon idealan, kiu nin antaŭenpuŝas ankaŭ al la paca batalado. Movado nuntempe fakte preskaŭ komplete ideala, kiel la Esperanto-movado, mortus pro ideala sensanĝeco ! La monda konstruo de l' popoloj ne estas kvazaŭ moderna metropolo, konstruita el unuformaj kvadrataj ŝtonmonumentoj, de kiuj nur la grandeco diferencas.

Ne ! Ne ! la mondo por ni estas belega ĝardeno en kiu ĉiu popolo kiel nura aparta florspeco libere flori povas kaj disvolviĝi kaj mirigi unu la aliajn per siaj kultura beleco kaj grandeco... Sed ĉiuj tiuj floroj bezonas la saman sunon, kiu ebligas la diversajn vivadojn, kiu ebligas vidi kaj mirigi unu la aliajn. Tiu spirita suno estas

Esperanto. Sed ĝi faras ankaŭ pli ol la ĉiela suno. Esperanto ne nur ebligas al la popoloj vivon kaj floradon. Ĝi donas la eblecon interkomuniki de l' beleco unu al la aliaj, por ke la tuto formu multflankan, grandiozan harmonion.

Kaj al dubantaj ne-esperantistoj ni povas certigi ke ĝuste Esperanto estos garantio por la propra nacio ; en la internaciaj kunvenoj la voĉo de malgrandaj popoloj sonus egalrajte kiel tiuj de la potencaj ŝtatoj. Ni supozu momenton ke en Flandrujo la dua lingvo (Ofte eĉ la unua !) ne estus plu la franca, sed Esperanto, mi vetas ke de tiu momento ankaŭ la flandra movado finfine triumfus.

Fanatikismo?... Kial ? Ĉu la devizo « unue la gepatra, due Esperanto » ne estas la vera gvidmotivo de ĉiu vera esperantisto ?

Ni precipe ne perdu tiun pacan armilon por la definitiva venko de nia kara Flandra-Esperanta idealo.

Estu ni konsekvencaj, kaj ĉiu vera Flandro, eĉ pro naciaj kialoj, lernos Esperanton !

POL VARENS

Ĉarmo !

Al mi okulumas, ridas
pala luno dum vespero ;
nediskrete ĝi min gvidas
en la regno de l' mistero.

Ĉe la ĉambro ni alvenas
de knabin' mirinde bela ;
luno min ĉe l' brako trenas
en angulo tre malhela.

Tie ĝi al mi instigas
la plej grandan priatenton.
Ĉarmulin' sin senvestigas,
kaj ne perdas mi momenton.

Apud lito nun jam pendas
vesto, jupo, strumpoj, zono ;
iometê mi atendas, ...
kaj jen falas pantalonono !

Plue ŝi ja ne hezitas,
kaj mi vidas kun surprizo
ke rapide terenglitas
ankaŭ la knabinĉemizo !

Pli diskrete mi foriras
el la regno de l' mistero ;
pala luno tamen diras :
« Estas ĉarmo de l' vespero ! »

La Batalkampoj

Vintrotag' ne longe daŭras,
eklumigas mi la lampon,
vidas mi la batalkampon
kaj senpove ... nur bedaŭras.

Meze en la ĉambro kuŝas
jen hundeto sur la flanko,
kaj sub la grandega ŝranko
pupo al la morto tuŝas.

Arlekenon ĝi ne ŝparis,
trafis lin la sama sorto ;
lin surprizis nigra morto
dume li grimacojn faris.

Plue jen sciuro estas,
kiu mortis sur anaso
pro la veneniga gaso ;
nukso inter ungoj restas.

Fine ankaŭ urso falis,
kies nun rigidaj kruroj
memorigas pri l' teruroj,
kiam laste li batalis.

Mian filon li eskortis,
bubo estis generalo,
sed la dormo dum batalo
venkis kaj lin tuj forportis.

Jaul KARNAS.

Montana.

Bibliografio

(Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas, unuope ricevitaĵn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol Redakcio, Administranto aŭ Flandra Esperanto-Instituto estos ignorataj.)

RICA KAJ SEN MONO, de E. Phillips Oppenheim, 222 paĝoj, bind. Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd. London.

Riĉega junulo, tiom enuas en la vivo, ke li fariĝas neŭrastenia. Laŭ konsilo de la kuracisto, li malaperas el sia medio por gajni dum tuta jaro proprajn vivrimedojn. La romano prezentas filmon de plej variaj fantaziaj travivaĵoj kaj, kiel multaj similaj historioj, finas per feliĉa edziĝo.

La libro estos bonvena ĉe la amantoj de emociiga literaturo kaj ĉe la amatoroj de belaspektaj libroj; malagrablaj tamen estas la oftaj preseraroj.

LA ORA STUPARO, de E. Phillips Oppenheim, 278 paĝoj, bind. Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd. London.

La plej riĉa homo el la mondo, aĉetanto de oro en ĉiu borso de la mondo, sin montras kiel defendanto de la Ligo de Nacioj. Per klakigo de la fingroj li povus neniigi registarojn; tamen li ne faras tion, sed male helpas ilin el financa krizo, interŝanĝe al subskribo de pakontrakto, kiu ĉesigos la militon dum multaj generacioj.

La heroo de la historio aperas kvazaŭ « Fantomas » figuro, kaj kvankam la tuta mondo malamas lin, simpatie kaptas la leganton.

La libro estas pli bone prizorgita ol la antaŭa kaj ankaŭ pli bona estas la traduko.

Ambaŭ verkoj apartenas al la « Populara Esperanto-Biblioteko », kiun transprenis E. P. C. Tiuj libroj estas el la plej malmultekostaj nuntempe eldonitaj en Esperantujo kaj bonvenaj por landoj kun malvalora valuto, kiel la nia.

Ili kostas 3ŝ 6 p., + afranko 6 p. (29 frankoj).

Estas la intenco de Esperanto Publishing Co daŭrigi la eldonon de bonaj binditaj libroj, sed necesos ke la Esperantistaro subtenu la entreprenon. Venontaj libroj aperos proksimume po 1 dum ĉiu ses monatoj.

ESPERANTO. — LA ĈIUTAGA VIVO. — Verkita de F. Swagers kaj A. Finet. 128 pĝ. Flandra Esperanto-Instituto disponas pri provizo de la supre nomita libro, je tre favora prezo. Ĝi kostas 3,50 fr., por grupoj, kiuj mendas minimume 10 ekzemplerojn, 2 fr. inkluzive sendkostoj.

La libro bonege taŭgas por rektmetodaj kursoj kaj por perfektigaj kursoj.

En la antaŭparolo, la aŭtoroj diras: « La enhavo de la Ĉiutaga Vivo estas vere tia, ke eĉ de la unuaj lecionoj la lernantoj estos emigataj esprimi siajn ideojn per mallongaj, praktikaj frazoj, interesos sin pri la afero kaj tuj montros al siaj amikoj la belecon, la simplecon de Esperanto. »

WEETLUST. — Maandblad voor vulgarisatie van Wetenschap en Natuurliefhebberij. (Hoofdopsteller Jos. Van Limbergen, Muggenberglei, 66, Deurne-Zuid, Antwerpen).

Tiu-ĉi nova, jam tre ĝuata monata revuo, enhavas en la numero de oktobro, interesplenan tripaĝan artikolon pri Esperanto de la plumo de S.ro E. Cortvriendt, nia agema propagandisto el Bruselo.

Elkore ni rekomendas tiun-ĉi altvaloran sciencan revuon. Abonprezo : 24 fr. por tuta jaro.

Momenton ni ridu!

Li. — Tiu-ĉi saŭco estas abomena! Ĝi kraketas inter la dentoj!

Ŝi. — Tamen, oni donis ĝian recepton hieraŭ en la radio.

Li. — Tiuokaze, mi estas preskaŭ certa, ke vi kuiris la parazitajn kun ĝi.

— Fraŭlino, mi ne mendis panon buterumitan je la du flankoj!

— Sed, ĝi ne estas tia.

— Tiam, kiu estas la buterumita flanko?

Ni gratulas.

La 10an de novembro fianĉiniĝis en Antwerpen nia ŝatata helpintino, F.ino Leoni Joukes, membrino de F. L. E., kun S.ro Karel Van Sand.

Elkorajn gratulojn!

ANONCETO. 24-jara knabino serĉas amikinson, ŝatanta bicikladi kaj kiu emus sekvontan someron fari grandan biciklan vojaĝon. Skribu al Lina Vandommele, Doornikstraat, 15, Kortrijk.

Nekrologo.

Mortis la 30an de oktobro 1935, en Corbeek-Loo, S.ro Kamiel Druant, patro de nia agema membro S.ro Celestin Druant-Catteeuw el Sint-Jans-Molenbeek.

Niajn sincerajn kondolencojn.

Subteno por la revuo.

Kiu sekvos? Debrouwere, Kortrijk 10,— fr.

Grupa Vivo

ANTWERPEN. — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

La 27an de oktobro nia grupo ekskursis bicikle al Heide kaj vizitis tie la lernejkolonion de Diesterweg sub la bona gvido de la agrabla lernejestro. La vizito tre interesa estis kaj la bonfaremeco kaj malavareco de la antverpena loĝantaro vereciĝis tie al ni. Restos al ni agrabla memoro pri tiu-ĉi vizito.

La aliajn tagojn de la monato la gemembroj jam forte laboris por nia estonta festo de Kristnasko. Diversaj donacoj por nia lotumado jam alvenis kaj la festprogramo preskaŭ estas preta. Niaj amikoj J. Théry kaj J. Timmermans prizorgos la afiŝojn kaj reklamilojn. La festo okazos la 25an de decembro je la 19 1/2a. en la salono « Kathedraal » Melkmarkt, 25. La geesperantistoj el la diversaj grupoj estos tutkore bonvenaj kaj ni esperas ke ili venos grandnombre.

BRUSSEL. — N. E. L. E.

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis, en la Bruselaj Esperanto-medioj, s-ano F. W. Bunting, Ĉseh-instruisto, el Batavio. Tiu aktiva Esperantisto plurfoje plinteresigis niajn kunvenojn per prelegetoj kaj donis gravajn konsilojn rilate la por-Esperanta propagando. La 17-an de oktobro, li prelegis, por la tuta Brusela Esperantistaro, en Hotel Central. Pritraktante la temon : La Logikeco de la Esperanta Gramatiko, li montriĝis vera kompetentulo sur tiu kampo.

Dezirante, ke inter la Brusela Esperantistaro, ekzistu pli intima kontakto, tiu samideano eklaboris al starigo de « supergrupa komisiono » kiu, en certaj okazoj, povus efike labori. La plimulto el la sep E-organizoj en Bruselo ekzistantaj, jam oficiale konsentis kunlabori kaj delegis reprezentanton. Nia grupo ankaŭ agis en tiu senco kun la nura kondiĉo, ke tiu komisiono, en sia laboro, ĉiam priatentu niajn Flandrajn sentojn.

MECHELEN. — LA ESTONTO.

Laŭ iniciato de nia ĉiam senlaca prezidanto, en ses Flandraj komunumoj okazos Ĉseh-kursoj. Ankaŭ ĉi-tie. La senpaga provleciono estos donata vendredon la 20an de decembro je la 19 1/2 a. akurate ! La lokon, verŝajne en lernejo, ni indikos en la loka gazetaro kaj dum la semajnaj grupkunvenoj, kiuj kompreneble ĉiam okazas Hombeeksche steenweg, 54.

La Ĉseh-kursoj, kiuj jam en multaj lokoj efektivigis mirindajn rezultatojn, ankaŭ donos novan laborinstigon, novan vivosangon al nia grupo, por la bono de nia Esperanta idealo.

En kafejo en Aberdeen. Kliento alvokas la kelneron.

— Kelnero, mi lasis fali pencon sub la tablon. Se vi trovos la moneron, redonu ĝin al mi. Se vi ne trovos ĝin, vi povas ĝin konservi por vi, kiel trinkmonon.

OOSTENDE. — OSTENDA GRUPO ESPERANTISTA.

De la komenco de oktobro ni ree regule kunvenis en nia ejo « Hotel de la Marine ». La 15an de oktobro okazis estrar-kunveno kun la celo : priparoli la vintran kurson kaj kelkajn grupaferojn. Post la diskutado estis bedaŭrinde al ni, ke ni devis komuniki al diversaj anoj kaj novuloj, ke la kurso ne okazos tiun-ĉi vintron. Pro personaj kaŭzoj nia instruisto estas malhelpita doni ĝin. Li promesis tamen rekomenci la kurson la venontan vintron. Intertempe ni esploras la eblecon eventuale organizi Ĉseh-kurson. La 6an de novembro, dumkunvene ni havis la plezuron renkonti la bruĝan Esperantiston S.ron Dhaenens. Antaŭ nelonge li transloĝiĝis al Ostendo, kaj aniĝis nun al la grupo.

RONSE. — « LA PACA STELO ».

Nia intenco estis raporti pri la sukceso de novaj du kursoj sed ĉar ili estis malfermitaj nur la 15an de la pasinta monato, ni priparolos tiun punkton je la novjara monato. La sama valoras pri nia jara manĝvespero.

Dum la nuna monato, ni havas 3 merkredojn, kiujn ni kaptos por riĉaj laboraj vesperoj por inde fermi la jaron 1935 kaj ĝoje komenci la novan jaron 1936.

Ni havas firman esperon, — kiel decas al esperantisto, — por ke nia grupo esperantigos multajn ne-esperantistojn pere de nia esperantistaro loka.

Antaŭ ol fini la jaron, nia fervora ŝparkasistino atendas pliajn obolojn, profite de ĉiu ŝparanto je la disdonado de ŝparinta mono.

Ni faras gravan alvokon al ĉiuj niaj membroj por inde rememori la Zamenhofan tagon, aĉetante almenau UNU libron por ke Esperantista Instituto, kies Estro estas S.ro Debrouwere, estu kontenta aŭ pli bone, kontentega pri la aĉeto.

Ni plenumas ĉi tie publike, dolĉan devon, nome danki tutkore S.ron Schroeeyers, kiu je nia simpla demando prizorgis al ni, la muzikon de la sukcesplena kanto « Sari Mareys ».

RUSELARA ESPERANTISTA GRUPO.

Elementa Kurso. — Diversmaniere ni faris propagandon por la nova elementa kurso. Por la enkonduka leciono ni invitas S.ron G. Debrouwere, kun lia lumbildaparato.

Viva gazeto. — Por antaŭenpuŝi la lingvoekzercadon ni enkondukis tiun utilan aranĝon : ne ĉiuj tamen ĝin utiligas ; aliaj kontraŭe kunlaboras. Dum la antaŭaj kunvenoj ni enkondukis la novan taskon : vice prepari iom pli gravan artikolon : sekve lastatempe pri-traktiĝis temoj sekvantaj : 1) detala raporto pri la pasinta liga kunveno (S.ro A. Willaert) 2) Ĉu skoltismo estas militarismo ? (S.ro H. Braekevelt) 3) Ni virinoj kaj la milito (F.ino A. Vansteenkiste). Por la proksimaj kunvenoj ni antaŭvidas la salutindan daŭrigon de tiu interesa aranĝo.

Nia membro S.ro E. Dhaenens transloĝiĝis al Oostende. Ni esperas ke tie li sin daŭre okupos pri Esperanto, kaj iĝu fervora membro de la tiea grupo.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA **(Vlaamsche Esperantisten - Bond)**

Voorzitter: H. Rainson, Hombeeksche steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: J. Vandendooren, Vanderlindenstraat, 125, Schaarbeek.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Bernard Bassleer, St. Rochuslaan, 93, Kortrijk.
Propaganda: Gerard Lenaers, Willemstraat, Hamme.
Postcheck: Flandra Ligo Esperantista, Kortrijk, nr. 2321.50.
Orgaan: « Flandra Esperantisto », maandblad.
Lidmaatschap (met maandblad): 20 fr. per jaar.

Aangesloten groepen:

Aalst: « Pioniro », lokaal: « De Koornbloem », Groote Markt; vergaderingen elken Woensdag avond.
Aarschot: « La Progreso », lokaal « Vlaamsch Huis », Deertschestraat; vergaderingen elken Zaterdag avond.
Antwerpen: « Flandrema Grupo Esperantista », lokaal « De Nieuwe Carnot », Carnotstraat, 70, vergaderingen elken Woensdag avond.
« La Rekta Vojo »; lokaal « De Gulden Kroon », St. Jacobsmarkt, 98; vergaderingen Donderdags om de 14 dagen.
Brugge: « Katolika Junulara Esperanto Grupo », Oude Gentweg, 3.
Brussei: « Nia estas la Estonteco » (N.E.L.E.); lokaal « Breughel », Em. Jacquemainlaan, 37; vergaderingen elken Dinsdag avond.
Edegem: « Nia Idealo », Drie Eikenstraat, 665.
Hamme: « Juna Flandrujo »; lokaal « Jong Vlaanderen », Kapelstraat, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Kortrijk: « Esperantista Grupo »; lokaal « In den Tuin », IJzerweglaan, 5; vergaderingen elken Woensdag avond.
Lede: « La Esperanta Stelo »; sekretariaat: Krommenellenboog, 60. Lede.
Leuven: « Nova Tagiĝo »; sekretariaat: Tienschestraat, 106.
Lichtervelde: Sekretariaat, Weststraat, 47.
Mechelen: « La Estonto », vergadering elken Vrijdag te 20 uur, Hombeeksche steenweg, 54.
Oostende: « Esperantista Grupo »; sekretariaat: Lijndraaiersstraat, 48.
Oudenaarde: « Al Paco »; sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: « Ruselara Grupo Esperantista »; Statiedreef, 177.
St. Niklaas: « Al Triumfo »; sekretariaat: Wegvoeringstraat, 73.

Alle inlichtingen verstrekken verder te:

Diksmuide: M. Maekelberg, Wilgenwijk, 28.
Gent: Juliette Terrijn, Raapstraat, 82.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat.
Hoboken: J. de Groot Caronstraat, 31.
Meenen: K. Depypere, Kortrijkstraat, 160.
Millen (Tongeren): L. Geukens, Langstraat.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: « La Paca Stelo », lokaal « Concordia », Statiestraat.
Thielt: R. Plettinck, Kromwalstraat, 24-c.

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

« BREUGHEL »

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj

malmultekostaj manĝoj

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

LUOTA

Varbu Abonantojn kaj Anoncantojn !

Speciale rekomendita Restoracio

„ La Renommée ”

St. Baafsplaats, 3 — GENT — Tel. : 420.42

apud la Belfrido.

Estro VAN DER PLANCKEN persone direktas la kuirejon kaj prizorgos la festenon kaj lundan tagmanĝon de la

7a FLANDRA ESPERANTISTA KONGRESO

Huis aanbevolen door V. T. B.

« Presejo de l' Centro », Kipdorpevest, 26, Antwerpen.